


Eŭropa Bulteno

Januaro 2016, Numero 156

LA ASEMBLEAJ KUNSIDOJ ĈI-JARE EN NITRO



Eŭropa Esperanto-Unio principe organizas ĉiun duan jaron sian kongreson kaj kadre de ĝi asembleajn kunsidojn. La estraro jam en 2012 decidis ke en 2016 okazos Eŭropa Kongreso de EEU en Nitra (Slovakio). Sed pro la fakto ke Nitra organizas ĉi-jare Universalan Kongreson de UEA, ni decidis ke ankaŭ en 2016 ne okazos aparta kongreso de EEU, sed nur asembleaj kaj estraraj kunsidoj dum la UK en Nitro kaj ke EEU maksimume kontribuos al la lingvo-politika konferenco „Perpektivoj de lingva politiko en Eŭropo“, kiun EEU aŭspicias kaj kunorganizas kun la slovakoj.

Tial la estraro invitas la asembleanojn de EEU plani partopreni en la Nitra Universala Kongreso por partopreni ankaŭ en la asembleaj kunsidoj de EEU kaj en la menciita lingvo-politika konferenco. La akurataj datoj de la asembleaj kunsidoj estos anoncitaj kun la tagordo ĝis majo.


Ni opinias ke tiel ni estos plej eble efikaj kaj ke ni havos certe kvoruman nombron de partoprenantoj en la laboro de la Asembleo.

Zlatko Tišljarić

LA 21-A DE FEBRUARO – INTERNACIA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO

EEU havas interalie en sia laborprogramo stimuli eŭropajn esperantistojn aktivi okaze de la Internacia Tago de Gepatraj Lingvoj. Ni proponas organizi prelegojn pri lingvoj, pri danĝero de ilia malapero, libroprezentojn ktp. Tiusence ni kun ĝojo aperigas alvokon de UEA okaze de tiu Tago, kiu estas tradukinda al ĉiuj naciaj lingvoj kaj bona teksto por proponi al lokaj ĵurnaloj kaj aliaj publikaj informrimedoj kelkajn tagojn antaŭ la 21-a de februaro. UEA proponis ankaŭ belan afiŝon kiu povas akompani la artikolon. Jen la alvoko:

La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako, en Bangladeŝo plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia geptra lingvo, la bengala, kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo «pli granda», parolata de la fortuloj de tiu momento.



Temas pri io, kio ripetiĝas - en diversaj formoj - daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio ne nur en Banglujo sed ankaŭ, ekzemple, en Nederlando, kie la parlamento aprobis la 29-an de septembro 2015 planon por laŭgrada forigo de la nederlanda lingvo el la elementaj lernejoj, favore al la angla.

Tiuj ne estis unikaj okazaĵoj. Kaj en Banglujo kaj en Nederlando temas pri la sama logiko: «mi estas la fortulo, vi silentu kaj eventuale, se vi volas paroli, vi parolu mian lingvon». Aliflanke kiel ĉiuj lingvistoj diras al ni (ni citas unu el ili, Ken Hale): «Kiam lingvo mortas, ni perdas grandan intelektan riĉecon, kvazaŭ oni faligis bombon sur la muzeon Louvre.» Krom la socia maljusteco, kiu okazas kiam ies gepatra lingvo estas malrespektata, necesas konscii pri la fakto, ke biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj,

interkonektitaj kaj unu de la alia dependantaj. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj esence necesaj por daŭripova biodiverseco, por la vivo. (1. Fina deklaro, 64a UN-NRO-konferenco, Bonn, 2011 kaj 2. Terralingua)

La 17-an de novembro 1999 Unesko proklamis la *21-an de februaro* la *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo*. En 2007 ankaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (3.) alvokis la membroŝtatojn por «*Antaŭenpuŝi la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo.*», samtempe deklarante la jaron 2008 *Internacia Jaro de Lingvoj*. En 2014 Unesko aperigis en sia retejo ankaŭ Esperanto-lingvan version de la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro, Irina Bokova (4.)

Kiel rilatas al ĉio ĉi *Esperanto*? La du aferoj ja rilatas inter si, ĉar la kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la multilingveco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj kiujn la movado por Esperanto defendas. Ni, la esperantistoj, volas neniun lingvon malaperigi, ni volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj regu lingva justeco. Ĉi-cele de multaj jaroj Universala Esperanto-Asocio (UEA) solene kunfestas ĉi tiun tagon, interalie por substreki ke Esperanto ne estas eliminanto de lingvoj, kiel estas uzataj la lingvoj de grandaj ekonomiaj kaj militistaj potencoj.

Esperanto, fakte estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdis FINNBOGADOTTIR (prezidanto de la Respubliko Islando, 1980-1996):

«*Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo.*» (5.)

Eble iu ankoraŭ demandas: «Kial ĝuste Esperanto?». La kialo estas simpla. Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj sistemoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en paco inter la popoloj.

«*Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiu lingvo estas la celo, al kiu esence kontribuas Esperanto.*» (6. Prof. Robert Phillipson). Esperanto estas ilo akcelanta atingon de justa komunikado kaj tiel de justaj rilatoj inter etnoj, kulturoj, popoloj. «... *Mi esperas, ke Esperanto daŭrigos la plenumadon de tiu duflanka rolo subtenante diversecon kaj kreante unuecon.*» (7. Rita Izsák, Speciala Raportanto de UN)

Sekve Esperanto helpas ĉiujn pluivivigi sian lingvon. Ĉi tiu estas la klara mesaĝo, kiun esperanto-parolantoj el la tuta mondo volas sendi al ĉiuj tutmonde, la 21-an de februaro.

Ekkonu la internacian lingvon, Esperanton (8.) per <http://www.esperanto.net/>!

UEA-informado

(Renato Corsetti, Emilio Cid, Vasil Kadifeli, Stefano Keller - teamo ZPI)

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2016/>

300 000 ESPERANTO-LERNANTOJ ĈE DUOLINGO.COM

Proponata artikolo por traduki nacilingven kaj oferti al lokaj publikrimedoj:

En la lingvolerna retejo Duolingo.com ĝis nun registriĝis preskaŭ 300 000 lernantoj por la Esperanto-kurso. Ĉiutage inter 150 kaj 200 Esperanto-lernantoj finas la kurson kaj pli ol mil novaj lernantoj ĉiutage eklernas Esperanton.

Facebook: 330 000 Esperanto-parolantoj

Esperanto pli kaj pli disvastiĝas en la interreto. Senkostaj lingvoretejoj kun almenaŭ 25 lingvoj hodiaŭ preskaŭ ĉiam ofertas lingvokursojn, vortarojn kaj aliajn lernhelpilojn ankaŭ por Esperanto. Google Translate tradukas ankaŭ Esperanton, ĉe Facebook 330 000 uzantoj indikas Esperanton kiel unu el siaj lingvoj, la ĉina registaro ĉiutage publikigas novaĵojn sur <http://esperanto.china.org.cn/>.
<https://www.facebook.com/pages/Esperanto/112347282113529>

Esperanto en pli ol 120 landoj tutmonde

Aparte por junuloj kaj junaj plenkreskuloj Esperanto ofte estas tre interesa lingvo: En pli ol 120 landoj tutmonde ekzistas Esperanto-parolantoj, kiuj ĝojas ricevi viziton el aliaj landoj. Internaciaj Esperanto-renkontiĝoj okazas ĉiujare en pluraj dekoj da landoj.

Nur triono de la lernotempo

Granda avantaĝo de Esperanto estas la rapida lernado de la lingvo. La plej multaj Esperanto-lernantoj raportas, ke ili bezonis por Esperanto maksimume trionon de la tempo, kiun ili bezonis por aliaj lingvoj. Esperanto havas regulan konstruon kaj simplan gramatikon. Multaj lernantoj komencas jam post dudek ĝis kvardek horoj da lernado uzi Esperanton en la interreto aŭ viziti lokan Esperanto-grupon.

La Esperanto-kurso ĉe Duolingo uzas la anglan kiel instrulingvon. Ĉe <http://lernu.net/> eblas lerni Esperanton per pluraj dekoj da lingvoj.

Lu Wunsch-Rolshoven

NEDERLANDAN LINGVON MINACAS LA SORTO DE LA IRLANDA

La nederlanda revueto de “Taalverdediging” (lingvo-defenado), raportas en sia numero de la 7-a de januaro 2016 ke la 9-an de septembro la nederlanda senato, la supera (unua) parlamenta ĉambro de Nederlando aprobis leĝon, laŭ kiu bazaj lernejoj en Nederlando rajtas instrui dum maksimume 15% de la instrutempo en la angla.

Sed, pli danĝere, la registaro rajtas per “maatregel van bestuur” (administra dispozicio) altigi tiun elcentaĵon al 30% kaj en posta fazo eĉ al 50%! La vojo al dulingvigo de la nederlanda socio estas malfermita!

Mi esperas, ke la nederlandaj esperantistoj amase subtenos la fondaĵon “Taalverdediging” (<http://www.taalverdediging.nl/>), ekzemple per membriĝo kaj aktiva kontraŭstaro al tiu

tendenco simple igi nederlandan lingvon duagrada en la propra patrujo. Bedaurinde la numero ankoraŭ ne estas trovebla en la reto.

Ĉu aliaj ŝtatoj de EU sekvos obee submetiĝi al usona kultura superrego kaj lingva genocido?

Johan Derks

(P.s. Vidu la suban artikolon de Nikola Rašić)

PAROLIGA SERVO ĈE EDUKADO.NET

En la jaro 2016 edukado.net komencas grandan, novan projekton, kiun ni nomis EKPAROLU!

Celo da la projekto:

- Doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi kaj informi ilin pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj.
- Vaste eluzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en la plua edukode de komencintoj
- Fortigi la lokajn klubojn kaj la movadon

Baza ideo:

Ene de edukado.net ni kreus surfacon, kie la du flankoj, nome NEVOJ – (komencintoj) kaj ONKLOJ (speciale trejnitaj esperantistoj) trovas unu la aliajn kaj helpe de skajpa kontaktiĝo pasigas kune parolsesiojn.

Legu pli ĉe la paĝo: <http://edukado.net/novajhoj?id=601>

Katalin Kováts

RENKONTIĜO KUN URBESTRO DE SŁUPSK KAJ MALFERMO DE SENATA E-EKSPOZICIO



Okazis renkontiĝo kun urbestro de Słupsk (Pollando), Robert Biedroń (kiu estas esperantisto kaj membro de EDE-Pollando), la 19-an de januaro 2016 en lia kabineto okaze de solena malfermo de la Senata E-ekspozicio en Darłówko (la 18an de januaro 2016). Pri ambaŭ eventoj vi povas legi en la artikolo pri EDE-Pollando en E-Vikipedio https://eo.wikipedia.org/wiki/Pola_Ascio_E%5C%ADropo_-_Demokratio_-_Esperanto#Honoraj_membroj_de_EDE-Pollando

Eduardo Kozyra

ESPERANTO EN MAKEDONIO

Esperanta ekspozicio honore al 52-a datreveno de E-societo "La Progreso" Prilep (fondita la 23-an de novembro 1963) kaj naskiĝtago de aŭtoro de Esperanto Lazar Zamenhof okazis la 15-an de decembro 2015. La ekspozicio estas kun fotoj, dokumentoj, afiŝoj kaj esperantaĵoj de la E-movado en Prilep, kun informoj pri la E-movado tra la mondo. La ekspozicion preparis s-ro Viktor Galeski sur la karton-pecoj (32 x 45 cm entute 15 kartonfolioj 120 x 80 cm po 4 pecoj aparte = 60 pecoj) je la nomo de la E-societo "La Progreso" el Prilep Respubliko Makedonio. La ekspozicion solene malfermis s-ro Viktor Galeski kaj partoprenis tideko da ĉeestantoj - vizitantoj. Bedaŭrinde neniu el alvokitaj TV kaj Radiostacioj nek alvenis nek surbendigis la solenan malfermon.

La ekspozicio daŭris kvar tagojn en la Domo de Kulturo "Marko Cepenkov" el Prilep. Krom la vizitantoj en la solena malfermo partoprenis ankaŭ parto de geesperantistoj, membroj de la E-societo "La Progreso" kaj Junulara E-societo "Estonto" el Prilep. Poste parto de iamaj gejunuloj eksmembroj de Junulara E-societo "Estonto" en najbara kafejo "Art kafe" pridiskutis kaj parolis pri la antaŭaj jaroj kiam ili estis aktivaj anoj de la societo kaj pri la ebleco denove revivigi la Societon.

Viktor Galeski

INTERESA LIBROPREZENTO EN ZAGREBO



Kadre de regulaj monataj renkontiĝoj la E-societo „Tibor Sekelj“ en Zagrebo okazigis la 13-an de januaro prezento de nova nekutima libro. Temas pri libro en la kroata lingvo „Pri tio mi vere fieras“ (Na ovo sam baŝ ponosna) kun 62 rakontoj de 62 virinaj aŭtorinoj. La redaktoro estas esperantistino Olga Ŝtajdohar Pađen, ĵurnalistino, kiu decidis aperigi verketojn de konataj kaj nekonataj verkistinoj kroataj je nekutima temo: Pri kio mi fieras? Virinoj

kutime ne multe pensas pri tio kion ili faris bonege kaj kio estas tre fierinda. Kaj jen libro kun tre impresaj rakontoj. Kial prezento en E-societo? Ĉar inter la aŭtorinoj estas 6 esperantistinoj. Iuj konataj, iuj ne. Libro interesa kaj tradukinda al Esperanto.

Dum la libroprezento en kiu partoprenis 5 aŭtorinoj kaj dudeko da aŭskultantoj okazis vigla diskuto pri literatura agado de virinoj.

Zlatko Tišljarić

LERNU FREMDLINGVOJN POR KOMPRENI KIEL MALKOMPRENI NAJBAROJN

Momente regas ekscito en nia hejmo ĉar nia filo, 15-jara gimnaziano, devus gastigi siajn kolegojn el la ĝemela lernejo el Germanio. Poste li vojaĝos al Germanio. Li studas en unu el plurcentaj t. n. «dulingvaj» mezlernejoj en Nederlando, kio praktike signifas ke la instruado okazas plejparte en la angla. En la unuaj kvar jaroj ili studas nur fremdajn lingvojn per la hejma nederlanda, ĉio cetera estas en la angla. Do se la gepatroj volas helpi la infanon pri matematiko, biologio aŭ historio, tio devas okazi angle. Nu, ni tamen faras nian laboron persiste en la hejma kroata kaj loka nederlanda, kio rezultis per tre bona sukceso de la filo ankaŭ en la fako nederlanda lingvo. Ni volas ke li povu matematiki ankaŭ en la gepatra kroata, en kiu li fakte neniam vizitis lernejon aŭ ricevis formalan edukadon. Estas ja iom stranga vicordo de liaj lingvoj: plej bone li regas la plej fremdan, la anglan, tiam la denaskan nederlandan kaj nur laste sian unuan lingvon, la gepatran kroatan. Nur dum lastaj du jaroj la edukado en tiu lernejo estos plene en la nederlanda, tiel ke la lernantoj fine akiros la konon de matematikaj aŭ fizikaj terminoj en la nederlanda, ilia denaska lingvo. Tio signifas ke nia familio estas perfekte trilingva: kroata, nederlanda kaj angla.

Krom tio en tiu lernejo oni lernas kvar fremdajn lingvojn: la germanan, francan, hispanan kaj ĉinan (du modernajn lingvojn anstataŭ la latina kaj la helena, kiel en la klasikaj gimnazioj). Pri la ĉina ni ne havas multajn esperojn, kvankam li estas tre sukcesa en tiu fako. Post ses jaroj la lernantoj scipovos la ĉinan kiel eŭropanoj la latinan post gimnazio: do efektive neuzeble. Li tamen tre bone scias kiel funkcias la aparta rilato inter la sono kaj skribo en tiu specifa lingvo, distingas la tonojn kaj konas la bazan ĉinan gramatikon. Se necesus plukonstrui li ja havus certan bazon.



Pri la germana, franca kaj la hispana mi povas diri ke tio apenau havas sencon. Oni devas studi multe kaj longe kaj oni apenau akiras kontentigan rezulton. Ĝis nun mi ne vere renkontis nederlandanon kiu baze de gimnazia studado povus flue paroli en la franca, germana aŭ hispana. Eble pli bone estus tute ne instrui tiujn lingvojn: enorma investo de tempo kontraŭ vere minimumaj rezultoj. Fakte la nederlandanoj nuntempe tendencas fariĝi nacio kun nur unu fremda lingvo: la angla.

Krom la tri nemalhaveblaj lingvoj (kroata, nederlanda, angla) en nia domo oni ĉiutage aŭdas kaj uzas ankaŭ Esperanton, la makedonan (mia plej ofta laborlingvo kiel tradukisto), foje la albanan aŭ la romaan. Krome ni rigardas ĉiuvespere *praktike nur* la germanan televidon, certe la novaĵojn. Ofte ni spektas televidon ankaŭ en la hispana, itala kaj precipe en la franca, en kiu mia edzino kaj mi alemenaŭ povas bone legi, se ne tiel bone paroli ĝin (neellernebla, se vi demandas nin, eĉ post kelkaj kursoj ĉe Alliance Francaise!).

Sed bone, ni revenu la nia interŝanĝo kun Germanio, ĉar tio ŝajnis promesplena. Ni estas nome vere eŭropa kaj vere lingvema familio. Precipe grava por ni estas la germana ĉar ni havas amaseton da familianoj en Germanio kaj Svislando, el kiuj kelkaj parolas nur la germanan. Krome Germanio ja estas nia unua najbaro kaj fine temas pri lando kaj kulturo kiu havis kaj havas enorman influon je kroata kulturo (granparte ja aŭstreca!) sed ankaŭ je la nederlanda kaj pluraj aliaj. Ni do volas ke ankaŭ nia filo bone parolu la germanan, la plej grandan kaj centran eŭropan lingvon. Tial ni do aparte ĝojis pri la interŝanĝo kun Germanio. Sed... Sed!

Post la kunveno de la gepatroj en la lernejo ni aŭdis kio fakte estis la unua celo de la interŝanĝo de vizitoj, almenaŭ por la germanoj, laŭdire. *Kaj tio estas: pliperfektigi la anglan!* Nome la nederlandaj infanoj ne vere bezonas tion. Pasintjare ili vizitis Bath en Britio, kaj tie ili aŭdis de iliaj britaj gastigaj familioj ke ili ĝis nun ne havis studentojn kiuj parolis la anglan pli bone ol ili mem.

Sed aliflanke mi ankaŭ havis okazon paroli kun la interŝanĝaj vizitantoj el Eŭskio, lernantoj de dulingva eŭska-kastilia lernejo. Ilia angla estis fakte tiom mizera ke apenaŭ eblis komunikado kun la nederlandaj gastigantoj. Ili ĝojegis kiam mi alparolis ilin kastilie (hispane, do). Tiam mi aŭdis ke ankau ilia eŭska ne vere estas uzebla. Sed tamen, la vizito utilis por la junaj eŭskoj ĉar ilia angla ja pliboniĝis post tio. Tre kompreneble ankaŭ: ili revenis hejmen sen lerni eĉ ne unu vorton de la nederlanda, kaj mi same ne aŭdis pri iu kazo ke nederlanda infano provis ekzercigi sian hispanan (kastilian) lingvon, kvankam ili devige studas tiun lingvon dum almenaŭ tri jaroj. Ŝajnas al mi ke ĝuste niaj nederlandaj infanoj plej malmulte profitas el tio, krom la fakto ke ĉiuj ŝatas vojaĝi kaj ne frekventi lernejon dum semajno. Do, nun estas la vico ke la etaj germanoj venu perfektigi sian anglan en Nederlando. Nia filo fakte havis la ideon malpermesi al siaj gepatroj paroli germane kun la gastoj! Fine mi elbatalis tion kiel la bazan homan rajton. Same, kiam niaj infanoj vizitos Germanion ili havos tie lecionojn en la angla kaj komunikos angle kun la gastigantoj. Tiel do funkcias la ideo pri plurlingva Eŭropo, se vi ĝis nun ne sciis. Almenaŭ en tiu ĉi kazo, ŝajne tipa por Nederlando, kaj eble ankaŭ por aliaj landoj en Eŭropo.

Tio igas min kolera kaj zorgoplena pri la estonto de nia komuna Eŭropo.

Kiel ĉiutaga sekvanto de germanaj televidaj novaĵoj mi povas regule sekvi la okazaĵojn en la germana socio, kio estas aparte grava en la lastaj historiaj jaroj, ĉefe nun dum la krizo pri la rifuĝintoj. Temas pri la decidaj jaroj por la estonto de Eŭropo kaj la okcidenta mondo. Aliflanke mi rimarkas ke ni en Nederlando, do tuj apud Germanio, estas komplete sensciaj pri okazaĵoj ĉe la najbaroj. Ĉi tie apenaŭ kvindeko da studentoj elektas studi germanistikon, kaj ege malmultas homoj kun bona rego de la germana, cetere nia praktike sola alilingva najbaro kaj LA PLEJ grava ekonomia partnero. La roterdama haveno fakte servas unuavice la germanan industrion el Ruhr-regiono. Tamen pri la germana kaj germanoj ni nederlandanoj scias ege malmulte, eĉ ne tiom kiom utilis kaj decus. Kompreneble, samas inversdirekte: Kion fakte la germanoj scias pri ni? Ni ofte vizitas Krefeld, nur 30 km for de la nederlanda limo, kie loĝas niaj familianoj. Ili ja foje venas butikumi en Venlo aŭ Roermond, sed cetere ili povus egale loĝi en Munkeno aŭ Berlino, se temas pri la kono de la najbara regiono, lingvo kaj kulturo.

Nia alia najbaro estas praktike samlingva Flandrio. Sed ankaŭ tiujn najbarojn ni konas malmulte, kvankam estas amaso da komunaj projektoj kadre de nederlandlingvujo. Foje ni rigardas la flandran televidon, sed malgraŭ la komuna lingvo ni ne multon komprenas: temas

ja pri tre malsama socio ol la nia. Cetere, kiam en la televido aperas la ĉiutaga parola lingvo, plena je lokaj dialektoj, nederlandanoj ne plu povas sekvi sen subtitoloj. Do eĉ Flandrio estas fremda lando. Por ne paroli pri la tute fora valona, franclingva Belgio. Inter Mastrihto kaj la franclingva belga Lieĝo estas duonhora veturo, sed kvazaŭ temas pri distanco de duona lumjaro. La nederlandanoj ne plu parolas la francan, eĉ flandroj malpli kaj malpli. (Tamen, pro la praktikaj kialoj, iom kresketas la kono de la nederlanda ĉe la valona flanko!).

Sed ni ne malesperu! Feliĉe ekzistas solvo por ĉiuj niaj problemoj, kiel ni vidas ekzemple de la lernejo de mia filo. Se ni ne povas rekte paroli kun niaj najbaroj, ni ja povas interparoli usone! Konfesu: ege eŭropa solvo, ĉu ne? Nome, la nederlandaj infanoj bonege distingas inter diversaj usonaj akĉentoj, ili scias ĉu la parolanto havas aŭstralian aŭ britan akĉenton, sed ne povas kompreni samlingvan flandron kun antverpena akĉento! En Bruselo ili tuj ekparolos angle, ĉar ja, ankaŭ la brusela nederlanda estas fremda kaj la francan oni ne konas sufiĉe. En Germanio, tre kompreneble, mi jam vidas la estonton: kun miaj krefeldaj familianoj mi baldaŭ anglumos, kaj parolos uson-sone. Tio estos nia sola komuna lingvo.

Ni ĉiuj konas la procezon. Kiel eŭropano mi opinias ke estas terure ke ni tiom malmulte konas unu la alian, kaj ke ni fakte malhavas la eblojn rekte komuniki unu kun la alia. Tio eblas nur per la usona / brita lingvo kaj konceptoj. Ili do ne havas problemojn kiujn ni havas: ili nur kreas problemojn por ni. Ili ne devas lerni ses lingvojn kiel mia filo (kun la sepa hejme, kiel filo de migrantoj!). Ili povas tuj transiri al agoj, ne perdi tempon pri la lingvolernado. Kaj gajni monon de aliaj kiuj klopodas kaj investegas por lerni ilian lingvon.

Tiom do pri la plurlingvismo en Eŭropo: absurda kaj sensenca afero. Ĝi nur kostas amason da mono kaj nur komplikas nian vivon. Ĝia sola celo estas montri ke nia rekta komunikado ne eblas sen helpo de ekstere kaj ke ni do DEVAS havi la anglan kiel interlingvon. Bedaŭrinde la plejmulto da Eŭropanoj konsentas pri tio kvankam ili per tio fariĝas kultura kolonio. Eble ni eĉ ne meritas pli bonon.

Simpla kombino de regiona plurlingveco kaj neŭtrala internacia lingvo povus fari el Eŭropo veran superpotencon. Sed ni ja daŭre restas per eternaj muroj interdividitaj.

Nikola Rašić

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de januaro 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, UEA-informado, Lu Wunsch-Rolshoven, Johan Derks, Katalin Kováts, Eduardo Kozyra, Viktor Galeski, Nikola Rašić

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

